

Hermann Löns,  
Lüneburga erikejo

*tradukita de Oskar Breddermann*

1. Lüneburgan erikejon  
en mirige bela land'  
mi trapasis ĉiuloken,  
multon montris voja rand'  
Faleri, falera  
ho; karul', karulin',  
via ja scias, scias ja.

3. Fratoj, lasu glasojn tinti;  
ĉar la muskatela vin'  
acidiĝus pro maluzo,  
tial ne eltrinku ĝin.  
Faleri, falera  
ho: karul', karulin',  
via ja scias, scias ja.

3. Ruĝajn cervojn ni ekĉasu  
gaje en arbaro, dum  
niaj hundoj laŭte bojas  
kaj pafiloj krakas "bum".  
Faleri, falera  
ho; karul', karulin',  
via ja scias, scias ja.

4. Vi belega, vi ĉarmega  
kvazaŭ lakt' kaj sango, flor';  
ni anime kunligiĝu  
kaj nin amu kor' al kor'.  
Faleri, falera  
ho; karul', karulin',  
via ja scias, scias ja.

...

Hermann Löns,  
Sur la Lujneburga  
erikejo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

1. Lujneburga erikejo,  
Vi mirakle bela land'.  
Tramigrante vin mi trovis  
Multon ĉe la vojo-rand'.  
Faleri, falera  
Kaj juĥajrasa, kaj juĥajrasa,  
Amatin', amatin';  
Ĉar vi scias tion:ja.

2. Fratoj, ni tintigu niajn  
Glasojn, ĉar la juna vin'  
Netrinkite acidiĝos.  
Do, ni nun eltrinku ĝin  
Faleri, falera  
Kaj juĥajrasa, kaj juĥajrasa,  
Amatin', amatin';  
Ĉar vi scias tion ja.

3. Kaj la hundoj, ili bojas,  
La pafilo, knalas ĝi,  
Ruĝojn cervojn volas ĉasi  
En arbaro verda ni.  
Faleri, falera  
Kaj juĥajrasa, kaj juĥajrasa,  
Amatin', amatin';  
Ĉar vi scias tion ja.

4. Ho, vi rava belulino,  
Bildo lakta-sanga vi,  
Niajn korojn interŝanĝu  
Ni, ĉar bonas tio ĉi.  
Faleri, falera  
Kaj juĥajrasa, kaj juĥajrasa,  
Amatin', amatin';  
Ĉar vi scias tion ja.

...

Hermann Löns,  
Auf der Lüneburger  
Heide

1. Auf der Lüneburger Heide  
In dem wunderschönen Land  
Ging ich auf und ging ich unter  
Allerlei am Weg ich fand  
Valleri, valleri,  
und jucheirassa, und jucheirassa,  
bester Schatz, bester Schatz,  
denn du weißt es weißt es ja.

2. Brüder lasst die Gläser klingen  
Denn der Muskatellerwein  
Wird vom langen Stehen sauer  
Ausgetrunken muss er sein  
Valleri, valleri,  
und jucheirassa, und jucheirassa,  
bester Schatz, bester Schatz,  
denn du weißt es weißt es ja.

3. Und die Bracken und die bellen  
Und die Büchse und die knallt  
Rote Hirsche woll'n wir jagen  
In dem grünen, grünen Wald  
Valleri, valleri,  
und jucheirassa, und jucheirassa,  
bester Schatz, bester Schatz,  
denn du weißt es weißt es ja.

4. Ei du Hübsche, ei du Feine  
Ei du Bild wie Milch und Blut  
Unsere Herzen woll'n wir tauschen  
Denn du glaubst nicht wie das tut  
Valleri, valleri,  
und jucheirassa, und jucheirassa,  
bester Schatz, bester Schatz,  
denn du weißt es weißt es ja.

...

Traduko de la Germana poemo “Auf der Lüneburger Heide” de HERMANN LÖNS (\*1866-08-29 – †1914-09-26) en Esperanton de Oskar Breddermann.

Arg-624-1262 (2012-10-23 21:11:11)

Tiun ĉi tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la kantlibreto “Jen la kanto de l’ vojaĝ”, eldonita de Dansk Esperanto-Forlag en la jaro 1973, reprezentita de D.E.F. (Dana Esperanto-Federacio).

Traduko de la Germana poemo “Auf der Lüneburger Heide” de HERMANN LÖNS (\*1866-08-29 – †1914-09-26) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).

Arg-624-1261 (2012-10-22 23:12:20)

Pri la aŭtoro vidu la retejojn [http://de.wikipedia.org/wiki/Hermann\\_L%C3%B6ns](http://de.wikipedia.org/wiki/Hermann_L%C3%B6ns) kaj <http://www.loens-verband.de/>.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HERMANN LÖNS (\*1866-08-29 – †1914-09-26).

Arg-624-1260 (2012-10-23 21:15:43)

Vidu: [http://de.wikipedia.org/wiki/Auf\\_der\\_L%C3%BCneburger\\_Heide](http://de.wikipedia.org/wiki/Auf_der_L%C3%BCneburger_Heide). La poemo estas kantebla laŭ melodio verkita de Ludwig Rahlfs. Vidu la retejojn [http://de.wikipedia.org/wiki/Ludwig\\_Rahlfs](http://de.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Rahlfs). La melodio estas aŭdebla en <http://ingeb.org/Lieder/AufderLu.html>. Pri la aŭtoro vidu la retejojn [http://de.wikipedia.org/wiki/Hermann\\_L%C3%B6ns](http://de.wikipedia.org/wiki/Hermann_L%C3%B6ns) kaj <http://www.loens-verband.de/>.